Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE)

Por la trijara estrarperiodo 2000-2002 elektitaj estraro kaj komitato de ISAE

Prezidanto	*Prof. Dr. Rüdiger SACHS <IsaeSachs@aol.com>* *Vor dem Brückentor 3, DE-37269 Eschwege*
Vicprezidanto	*Prof. Dr. Ottó HASZPRA <haot@freemail.hu>* *Húr u. 9A. III.lph.1/3, HU-1223 Budapest*
Estrarano	*Prof. Dr. Heiner EICHNER <heiner.eichner@univie.ac.at>* *Lueger-Ring 1, AT-1010 Wien*
Estrarano	*S-ro SUGANO Takeo <pi2t-sgn@asahi-net.or.jp>* *6-5 Ohte-tyoo, Takatuki-si, JP-569 Oosaka-hu*
Estrarano	*Dr. Martin WEICHERt< martin.weicher@carmen.se>* *Fjällg.14, 1 re., SE-41317 Göteborg*
Komitatano	*S-ro Jacques JOGUIN* *5, Impasse du repos, FR-38100 Grenoble*
Komitatano A *de ISAE ĉe UEA*	*D-rino Nina Korejenevskaja-Gouriou* *Bat.C, L'Espiguette, Rue de Verdun, FR-13140 Miramas*
Kasrevizoro	*Ing. Peter Hauser <Ercmonatara.EC@t-online.de>* *Pf. 401243, DE-63277 Dreieich*
Kasrevizorino	*S-ino Jutta Buss <Buss.Jutta@aol.com>* *Sossenheimer Weg 53, DE-65824 Schwalbach*

Landaj Delegitoj de ISAE

Bosnio-Hercegovino	*Ing. Ljubiša Preradović <ljubopr@inecco.net>* *Jevrejska 22, BA-78000 Banja Luka*
Ĉilio	*Dr. José Antonio Vergara <joseav@llanchipal.cl>* *Casilla 508, CL - Puerto Montt*
Germanio	*S-rino Jutta Buss, adreso vd. supre*
Japanio	*S-ro Sugano Takeo, adreso vd. supre*
Kanado	*Prof. Stevens T. Norvell jr. <stevens.norvell@dal.ca>* *2, Windermere Rd., NS Halifax CA, B3M 1N9*
Pollando	*D-rino Alicja Lewanderska-Quednau* *<lewander@forst.uni-muenchen.de>* *ul. Kormoranów 19/21, PL 44-100 Gliwice*
Rumanio	*D-rino Maria Butan* *Aleea Sportivilor 34, et.1,apt.3, RO-1900 Timişoara*

Responsa redaktanto: *R. Sachs (DE) – sa*
Kunredaktanto : *J. Kavka (CZ) – ka*
Lingvaj kontrolantoj : *O. Haszpra (HU) – ha,*
S. Schweiger (DE) – sc, J. Wozniczka (PL) – wo, kaj aliaj.

Eldonkvanto: 200 ekzempleroj

Adreslisto laŭ kotizoj ricevitaj antaŭ ekspedo. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la koncernaj aŭtoroj. Ili ankaŭ respondecas pri formo kaj formato, se ili mem kompostis.

Josef KAVKA

Scienca Vortaro de Esperanto

(akompane al "La nova PIV 2002")

PREFACO

KOREKTITA SCIENCA VORTARO

BIBLIOGRAFIO

ENHAVO

PREFACO

1. Scienca vortaro de Esperanto 3
2. Neasimilitaj nomoj 4
3. Fonetismo kaj grafismo 4
4. Fontlingvaj finaĵoj 7
5. Genitivaj radikoj 8
6. Timo antaŭ homonimo 9
7. Al la listo de la korektindaĵoj 11

KOREKTITA SCIENCA VORTARO 13

BIBLIOGRAFIO 53

Dankesprimo 55

Priaŭtoraj informo kaj adreso 56

Scienca Vortaro de Esperanto (akompane al la nova PIV)

Josef KAVKA

PREFACO

1. Scienca vortaro de Esperanto

Ĉu tia vortaro estas nepre bezonata, se Esperanto disponas sian tradician, eĉ la noveldonitan PIV? Kaj krome, ja ekzistas fakaj vortaroj, ekz. ĥemia, matematika, medicina, mineralogia, geologia...

Tamen, la profesiaj sciencistoj bezonas **fidindan** vortaron, kiu helpus al ili per vere **planlingvaj,** internacie establitaj terminoj. Jes, eblas akcepti la sciencan vorttrezoron de PIV, kiom temas pri registrado de elektendaj vortoj, kvankam ties elekto certe suferas pro subjektiveco. Nu, la PIV-kompilintoj sendube rajtas elekti laŭ sia gusto. Ankaŭ koncerne formuladon de la difinoj eblas konsenti kun PIV: ja la difinoj evoluas kaj evoluos laŭ freŝdataj esplorrezultoj.

Ĝis tie ĉi, la "ludregularo" de PIV estas sufiĉe kontentiga. Male, apenaŭ oni povas akcepti **malordon en vortformoj,** ĉu fonetisman, ĉu grafisman, ĉu morfologian, ĉu alispecan. Nome, la plej grava manko de la scienca leksiko en PIV estas ĝia **malkohereco,** kun kiu terminaroj kaj nomenklaturoj tute ne povas kongrui. Ĉi-koncerne, la okulfrapaj pekoj de PIV fortimigas ne nur sciencistojn, sed foje provokas ankaŭ publikon laikan, kiu celas komunuze interkompreniĝi, nenion alian.

Komparante kun sia denaska etnolingvo, la publiko ofte ne scias respondi, kial la internacia lingvo ofertas ekzemple tiom da centprocente sinonimaj duoblaĵoj, se ĝi ambicias esti lernebla pli facile. Jes, ĝia gramatiko fieras pro mirinda simpleco, sed kial ĝia vorttrezoro impresas tiom fatrase?

2. Neasimilitaj nomoj

La nova PIV konscias, ke neasimilitaj nomoj apenaŭ rajtas registriĝi en Esperanto-vortaroj. Kompare kun la eldono de 1970, la freŝdata sukcesis elsarki multon da neasimilitaj loknomoj. Sed kial restis ekz. la duoninsulo "Kola"? Ankaŭ malaperis multo da virinaj nomoj kun la finaĵo –A. Tamen, tiu ĉi klopodo ne estis sufiĉe konsekvenca: multaj restis, ekz. *Gerda, Hilda, Izabela, Lea, Lidia.* Krome, preskaŭ regule restis sen fleksia ebleco la nomoj bibliaj.

3. Fonetismo kaj grafismo

Memkomprene validu, ke internacie establitaj terminoj devas adaptiĝi al la alfabeto de Esperanto, tamen laŭeble konserviĝu, por pli facila rekonebleco, ilia aspekto grafisma. Jen, laŭ la ĝenerale validaj principoj de terminologio, oni strebu zorge serĉi ekvilibron inter fonetismo kaj grafismo.

Rilate al la scienca leksiko de Esperanto eblas observi kontraston inter la brilega lingvosento de *Zamenhof* unuflanke kaj la nivelo de liaj posteuloj aliflanke. Oficialigante kaj neoficiale enkondukante multon da terminoj, foje ili procedis ne nur senrespekte al la fontlingvoj, sed eĉ tute sensisteme, do "malplanlingve".

K-formoj kontraŭ Ĥ-formoj

La plej okulfrapa fenomeno en PIV, bedaŭrinde tro ofte imitata fare de aliaj vortaroj, estas la evidenta trudado de K anstataŭ la laŭfundamenta konservado de Ĥ, ĉu en grek-, latin-, slav- aŭ ali-devenaj vortoj. Temas pri fakta diskriminacio de la fontlingvoj. La nuna rezulto fortimigas sciencistan publikon tiom pli, ke oni nature inklinas al komparado de la "planlingvo" kun la "neplanitaj" etnolingvoj. La komparado ne impresas bonŝance por Esperanto.

Al la Ĥ-problemo mi dediĉis atenton jam plurfoje (i.a en 1980, 1997, 2000), sed kadre de tiu ĉi prefaco sufiĉu nur iometo da ekzemploj:

Kinino laŭ PIV estas alkaloido el *Cinchona*, laŭ mi kreskiga hormono ricevinta sian nomon laŭ la greka *kineo* = mi movas. Nu, la alkaloido kun sia plejado da parencaj terminoj (ekz. ĥinolino, benzoĥinono) nepre meritas la nomon **ĥinino**.

Dua ekzemplo: En la nova PIV **lilĥeno** estas dermatozo, dum la fundamenta **likeno** funkcias botanike. Ĉu ne estus pli prudente, lasi ambaŭsfere la sciencan Ĥ-formon laŭ la greka *leiĥo* = mi lekas, dum la K-formo eventuale pluservu por uzado laika?

Tria ekzemplo el la sennombraj tiaspecaj PIVaĵoj: Kondamninde, sam-etimaj terminoj estas traktataj malsimile: stiĥometrio - sed "polistiko", ĥoro - sed "koregrafo" k.t.p. Tian ĥaoson etnolingvo apenaŭ povas allasi: angle *chorus, choreographer*; germane *Chor, Choreograph*; ruse *ĥor, ĥormejster*...

Aparte kurioza montriĝas la sistemo de PIV, se oni komparas botanikon kaj medicinon unuflanke kaj zoologion aliflanke. Okulon frapas, kiom "konsekvence" procedas la vortarego: medicine registriĝas nur K-formoj: "kalazio, kiasmo, koledoko" k.a. Same botanike: "kameropso, karao, kelidonio" k.a. Alimaniere oni procedas en zoologio: ĥameleono, ĥelicero, ĥelonio k.a. referencas al la K-formoj, por liveri la difinojn. Evidente, la fundamentaj Ĥ-formoj estas sentataj de PIV kiel io tre ĝena, eĉ abomena.

Ĉ-formoj

Kulmino de la diletanta traktado estas ekz. "ĉimozino, Kolĉido, kolĉikino" k.a. anstataŭ la ĝustaj **ĥimozino, Kollĥido, kollĥicino**. Eĉ troviĝas "ekimozo" anstataŭ **eklĥimozo**, kiu ja laŭetime koheras kun ĥimozino, PIVe "ĉimozino". Jen nekredebla manko de terminologia erudicio...

DĴ, Ĝ, Ĵ

Tradukante la maparon POŜATLASO DE LA MONDO (PM-1974), d-ro *Pumpr* kaj mi longe cerbumadis super esperantigo de arabaj, hindaj kaj aliaj nelatinskribaj nomoj, kiuj historie troviĝas jen sub influo anglofona (ekz. Ĝibraltaro), jen frankofona (ekz. Djibuto). La siste-

mon uzitan de PM ni eksplikis en 1972. Kvankam prononce temas plejparte pri Ĝ, ne eblas apliki unuforman ortografion. Cetere, la problemo ekzistas ankaŭ ekster la nomoj geografiaj: la Ĵ en ĵazo ne estas fonetike identa kun *J* en *jazz* samkiel ne Ĵ en Ĵerzejo k.a. Tamen, la PIVa "Jamajko" fonetike tro diverĝas de la originalo; jen kial estas rekomendinda Ĵamajko. Male, "Ĝamajko" estus pli proksima prononce, sed tro kurioza grafisme, same kiel la PIVa "Ĝakarto", por kiu pleje konvenus la formo Dĵakarto. La nova PIV nepre estu devinta establi iom da ordo ĉi-koncerna. Ree: ne temas sole pri loknomoj: ekz. "jado" devus fariĝi **ĵadeito**, konforme al la internacie kodigita uzo mineralogia.

V kaj B

Jen problemo tre ĝena, heredita jam dekomence. La fundamenta adjektivo kurba (laŭ la latina *curvus*) evidente ne harmonias kun kurvimetro, kurvaturo k.a. Ekz. la birdo *Loxia curvirostra* (= loksio kurvarostra) havas kurban "rostron" (= bekon). Male, en la nomoj Havano kaj Kordovo, Esperanto inklinas al la laŭprononca V, kvankam originale troviĝas *B*.

S kaj Z

En 1990 mi provis demonstri, ke *Zamenhof* neniam transformis la fontlingvan *–SS–* per la esperanta –Z–, do ke la vorto "procezo" estas fonetike fuŝa. Aliflanke, la intervokala *–S–* de fontlinvo transformiĝas al –Z– de Esperanto, ekz. Ezopo, izoli, uzi. Tamen, en la nova PIV restis "aposiopezo, fleso, keroseno, tetanoso" k.a.

EE kaj IE

Nekonsekvence procedas PIV: la planto **frezio** estas nomita laŭ *Frees*, sed *Freetown* fariĝas "Fritaŭno", kvankam la angla originalo pli eble invitus al **Fretaŭno**. Pri la germana *IE* mi prelegis en Homburgo (1995, publikigite en 2001). Laŭ la modelo **Vieno**, la PIVa "difenbakio" fariĝu **diefenbaĥio**, sendube pli simila al la germana kaj latina originaloj.

Eble preteratente restis "fotogrametrio", dum en grammolekulo estas la pravaj du M. Strange aspektas "bakteriofaĝo" apud la ĝustaj **antropofago** kaj **fagocito**.

Antaŭ ol fermi la jam tro longan parton fonetisman-grafisman: Apenaŭ komprenebla – okaze de la franceska PIV – estas la diferenca interpreto de *Beaufort* = "Boforto" kaj *Fréchet* = "Freŝeo". Laŭ mi devas esti Freŝeto. Ĉu la francoj ne kapablas esperantigi siajn proprajn nomojn?

4. Fontlingvaj finaĵoj

Kritikante la novan PIV, oni provu resumi, kiamaniere Esperanto kutimas manovri kun kelkaj finaĵoj grek- kaj latin-devenaj.

-ON kaj -UM

Ambaŭ ĉi tiuj finaĵoj apartenas al substantivoj de la neŭtra genro. La fundamentaj demono, kolofono, kolono, leksikono k.a. montras, ke *Zamenhof* sisteme faris la grekan *–ON* parto de la Esperanto-radiko. Cetere ankaŭ multaj, ĉu oficialaj, ĉu neoficialaj terminoj obeas la saman principon: deŭkaliono, martagono k.a. Kun tio kontrastas "filodendro, klerodendro, liriodendro, rododendro". Planlingve devus esti filodendrono, klerodendrono k.t.p.

Aliflanke, la latina *–UM* laŭfundamente ne fariĝis radikparto. *Verbum* = verbo. Bedaŭre, da oficialaĵoj de la tipo "verbumo" ekzistas pluro: "albumo, forumo, harmoniumo" k.t.p. Eĉ pli multe da neoficialaĵoj elkoviĝis: "galiumo", "geumo" (latine *Geum*), sed kritmo (*Crithmum*) kaj ligeo (*Lygeum*), sed ree "litrumo" (*Lythrum*). La problemo nature ne koncernas nur botanikon; el somatologio servu tri ekzemploj: la fundamenta **sakro** homonima kun la verbo sakri, nomiĝas latine *os sacrum*, sed alia osto *sternum*, sternita antaŭbruste, PIViĝis kiel "sternumo", ĝuste **sterno**. Ke la finaĵo *–UM* ne apartenas al la radiko, evidentiĝas el koheraj anatomiaj terminoj, ekz. *angulus sterni*, *corpus sterni*, *synchondroses sternales*. La partoj de la dika intesto, science kolono, estas **ceko** kaj **rekto**. Ja tiu ĉi estas rekta! (PIVe "cekumo, rektumo".)

-AO kaj aliaj

Estas memkomprene, ke la ina finaĵo *-A* de la latina deklinacio **ne** apartenas al la radiko, sed okaze de nelatinaĵoj povas aperi duboj. La fundamenta "boao" per sia osceda trisilabeco spitas la dusilabecon de la etnolingvaj ekvivalentoj. Bonŝance koalo ne fariĝis "koalao", malbonŝance da neoficialaj -AOJ ekzistas en la nova PIV pluraj dekoj, sed sufiĉu unusola ekzemplo: "alkao" referencas al "aŭko", sed ambaŭ formoj estas strangaj okaze de la latinaj taksonoj *Alca* kaj *Alcidae*. En Esperanto la birdo devus nomiĝi **alco** kaj ĝia familio **alcedoj**. Pri "Ganao" necesas akcenti, ke tiu *A* forfalas en adjektivoj: ĉeĥe *ghanský*, angle *Ghanian*, france *Ghanéen*, do laŭ PM (1971) substantive **Gano**. La radikfinan vokalon pli detale pritraktas la supre menciita publikigaĵo de 1972 kaj krome tiu de 1996, kiu dediĉas atenton al PIVaj vortoj kun -AO, -EO, -IO, -OO, -UO.

5. Genitivaj radikoj

Kvazaŭ flue transirante al morfologio, oni devas konstati, ke *Zamenhof* klare preferis radikojn **genitivajn** en substantivoj ĉu latin-, ĉu grek-devenaj. Temas pri deklinaciaj okazoj, kiam radiko genitiva diverĝas de radiko nominativa. Ekzemple la vorto **leporo** estas formita ne el la latina nominativo *lep/us*, sed el la genitivo *lepor/is*. El la greka (latine transskribita) *asp/is*, genitive *aspid/os* devenas la fundamenta **aspido**. Ĝenerale, la genitivaj radikoj estas nekompareble pli produktivaj por derivado. Tiun ĉi fakton respektu la scienca leksiko de Esperanto, do, ne allasu formojn de la tipo "lep/o", "asp/o" aŭ eĉ "aspis/o". Mi devas koncedi, ke en multaj okazoj PIV registras nomojn genitiv-radikajn. Tamen bedaŭrinde, necesas konstati ankaŭ neakcepteblan malordon. Kadre de mia prefaco mi tuŝu kelkon da ekzemploj.

-OPS, -OPSIS

La greka *Kyklops*, genitive *Kyklopos*, latine transskribita *Cyclops*, genitive *Cyclopis* prave esperantiĝas per **ciklopo**. Sed kial *Kekrops* (latine *Cecrops*, genitive *Cecropis*) subite PIViĝas kiel "Cekropso" anstataŭ la ĝusta **Cekropo**? Kiu povus al mi klarigi tiaspecan malplanlingvan sintenon, tute ne unufojan? Ja bonvolu konvinkiĝi: "kameropso" (*Chamaerops*), "hidropso" (*hydrops*), "litopso" (*Lithops*), sed subite **meropo** (*Merops*).

Tamen, la plej mokinda sinteno estas "opsigi" ankaŭ la nomojn, kiuj finiĝas je *-opsis*, genitive *-opsidis*, greke *-opsidos*: La PIVaj "ampelopso" (*Ampelopsis*, cetere pli moderne *Parthenocissus*), "galeopso" (*Galeopsis*), "koreopso" (*Coreopsis*) devus fariĝi **ampelopsido**, **galeopsido**, **koreopsido** (kp. la italan *corèopside*).

-PUS

Absolute nescience procedis PIV kun la grekdevenaj vortoj, kiuj havas la postjungitan *-pus* (= piedo), genitive *-podos*. La malnova PIV prave registris: **antipodo** (laŭvorte "kontraŭpiedo"), **dekapodo** ("dekpiedo" k.a., sed ankaŭ "dazipo", "lagopo" k.a. anstataŭ la ĝustaj **dazipodo** ("denspiedo"), **lagopodo** ("leporpiedo") kaj multaj aliaj.

La nova PIV, iom pli instruita pri la greka lingvo, "solvis" la problemon jene: dazip(od)o, lagop(od)o k.a., sed ankaŭ nur oktopodo, sen allasi la duoblaĵon. Ĉu tio signifu, ke "-poj" servu por uzo laika, dum "-podoj" por la scienca? Sed tiam laikoj ne havus sian "oktopo", kvankam ili pli facile renkontus ĝin ol aliajn "-pojn"!

Eĉ: "apuso" referencas al **apodo** ("senpiedo"). Ĉu tia fuŝaĵo kiel "apuso" entute estas registrinda?

Pardonu, ke mi tro longe haltis ĉe la genitivaj radikoj. Ja en PIV fantomas vere multaj centoj da misformitaj nomoj, kiuj ne volas respekti ĝeneralajn principojn de kohera terminologio. Tio estas enigma, ĉar kuntroviĝas tie tute senriproĉaj genitivradikaj nomoj, ekz. **okcipito** (el la latina *occiput* = "okkapo").

6. Timo antaŭ homonimo

La enigmo estas divenebla almenaŭ parte, se temas pri la sfero terminologia-nomenklatura: oni timas homonimecon.

"Neniu lingvo kapablas eviti homonimecon, tiom malpli la planlingvo Esperanto, kies afiksa sistemo evidente kunportas pli oftan ko-

incidon de vortoj etimologie aŭ morfologie fremdaj, sed fakte samformaj." Tion ĉi mi estis skribinta en 1994 (represite en 1996).

La biologiaj nomenklaturoj eĉ allasas homonimojn, se ili troviĝas kadre de malsamaj superaj taksonoj.

Kiel kondukas senbaza timo ("homonimfobio") al perturboj de nomenklatura sistemo, evidentiĝu el la listo de la korektitaj terminoj (pp. 13 - 51); ĉi-loke mi ekzemplu, al kiaj kaprioloj emas PIV, se ĝi insistas ĉial eviti homonimecon.

La greka *OI*, latine transdonata per *OE*, transiras en Esperanto kiel E (ekonomio). La grekan *oistros* (latine *Oestrus*), *Zamenhof* (laŭ la indiko de PIV) esperantigis per "ojstro", por eviti la homonimecon kun la fundamenta estro. Sed tio ne estas ĉio: kun la dolorige pikanta diptero semantike koheras la folikulaj hormonoj **estrogenoj**. (Permesu al mi la ŝercon: ili ne generas estrojn!). Nu, al PIV plaĉis nek E, nek OJ, do al ĝi plaĉis "oestro", kvankam internacie (krom la franca *oestre*) estabiiĝis E: *Cs estrogen*, *En estrogene*, *It estròġeno*, k.t.p. Cetere ekzistas multegaj vortoj, en kiuj la greka *OI* (= latina *OE*) en Esperanto normale redoniĝas per E: celentero, celomo, enotero k.a. Sed ja, okaze de tiuj ne "ĝenas" homonimeco kun iu fundamentaĵo...

Tamen: se ne ĝenas ekzemple la fundamenta **lukso** por same nomi la unuon de lumiga intenso, certe ne ĝenos la fundamenta muso, se science ĝi estos nomata **muro** kaj ĝia familio **muredoj** (latine *Mus*, genitive *Muris*, familie *Muridae*). Konfuzon inter la ronĝulo kaj la masonaĵo apenaŭ ebligus reala kunteksto.

Akceptante tian principon, oni allasus **nepo** ne nur por "prafilo", sed ankaŭ por la hemiptero *Nepa, Nepidae*, do ne estus bezonata la misformita PIVaĵo "nepao". Bedaŭre, en PIV svarmas nomoj misformitaj pro homonimfobio: "karao" por *Chara*, anstataŭ la ĝusta **ĥaro**, laŭ kiu estas nomita la klaso *Charophyceae* = **ĥaroficeoj** (nepre ne "karaoficeoj"); la PIVa "litrumo" por *Lythrum* avertas antaŭ "danĝera" konfuzo kun **litro**, la volumena mezurunuo. Sed la botanikistoj, nesuferantaj pro la homonimfobio, certe nomos la planton **litro** kaj ĝian familion **litracoj** (*Lythraceae*), nepre ne "litrumacoj". Same ili preferos **citro**, ne "citruso", **takso, taksolo**, ne "taksuso", "taksusolo" k.t.p.

Aliflanke, facilanima forvišado de naturaj koherecoj estas tipa por PIV. Ekzemple "kenopodio" (ĝuste **ĥenopodio**) devenas de la greka *ĥen* = ansero, do temas pri "anseropiedo". En PIV ĝi staras proksime apud **kenozoiko** (= "nova faŭn-epoko", ĉar la greka *kainos* = nova). Evidente, la artefarita homonimeco ĉe la du keno- ne gravas por PIV...

7. Al la listo de la korektindaĵoj

Mia konscienco ekriproĉas, ke per la prefaco, jam troe mi draŝis la kompatindan novan PIV. Do, necesas honeste emfazi, ke pli da terminoj ĝiaj estas en plena ordo. La sekvanta listo fariĝu fidela akompananto de la nova PIV, sen kiu sciencisto, aplikanta Esperanton, apenaŭ povas aktivi. Malgraŭ ĉiuj rezervoj, inter kiuj mi ne akcentis senbridan eksperimentadon pri tute novaj, internacie neekzistantaj terminoj, ekz. "petro" anstataŭ **rokaĵo**, "siliciato" anstataŭ **silikato**, mi devas konstati, ke la kompilintoj plenumis grandegan laboron. Bedaŭre por la malbono de Esperanto, tiu laboro rezultis kiel ofte sensistema, do ĝenerale apenaŭ fidinda...

La prefaco, por ankoraŭfoje akcenti la situacion, toleru ankoraŭ po unu ekzemplo el mineralogio, botaniko kaj zoologio:

1. Estas absurde misformi la internacie kodigitan nomon **serpentino** al "serpenteno" nur tial, ke ĝi koincidas kun femalo de serpento. Neniu mineralogo aŭ petrologo emus aprobi tiaspecan sintenon al la establita nomenklaturo.

2. Botanikisto, respektanta la grekan deklinacion, kompetente esperantigis la plantnomon **reado** (originale *rhoeas*), ĉar la nominativa finaĵo *–AS* genitive transformiĝas al *–ADOS*. Do, bonorda esperantigo.

3. Kontraste, "anariko" atestas, ke ties "inventinto" nemulton sciis pri la sama deklinacio, tiom malpli pri la greka fonetiko: la zoologia nomo *Anarrhichas*, familie *Anarrhichadidae* ja devus fariĝi **anarilĥado**, **anarilĥadedoj**.

Do, ne mirinde, ke la sciencistoj hezitos laŭdi la novan PIV. Bonŝance, la ceteraj esperantistoj, sen erudicio pri tiaspecaj "bagatelaĵoj" povos senĝene plezuriĝadi per la riĉe ilustrita vortarego.

Al la listo mem:

La unua (maldekstra) kolumno registras la korektitajn vortformojn. Tiujn akompanas – okaze de homonimeco – eventualaj uzosferoj plus atentigo pri **pseŭdo**afiksoj, do nepraj **radikpartoj**.

La dua (dekstra) kolumno enkrampe registras la korektendajn ekvivalentojn laŭ la nova PIV (2002), eventuale ankaŭ referencojn al nomoj aliliteraj.

Mallongigoj:

f. = vortformo forigenda

l. = vortformo utiligebla laike

sc. = vortformo utiligebla science

KOREKTITA SCIENCA VORTARO

A

		(abelo l., apo sc.)
acero platanoida	unuvorte: platanoido	(plataneca acero f.)
acero pseŭdoplatana	unuvorte: pseŭdoplatano	(platanacero f.)
acero saĥara	unuvorte: saĥaracero	(sukeracero, l.)
Admiralitata insularo		(Admiraltoj f.)
adonanto	por *Adonanthe vernalis*	(adonido f.)
adonido	por *Adonis aestivalis, A. autumnalis*	
adularo		(adularia f.)
aĥato		(agato l.)
aĥenio		(akeno f.)
		(akeo f.)
Aĥerono		(Akerono f.)
aĥileo		(akileo f.)
aĥorio		(akorio f.)
aĥromata		(akromata f.)
aĥromatopsia		(akromatopsia f.)
akrostiĥo		(akrostiko f.)
akso	por la vertebro atlanto	(aksiso f.)
akvilo		(aglo l.)
		(alando l., leŭcisko sc.)
		(alkao, f.)
alc/o,	-edoj por *Alcidae*	(alfo l., stipo sc.)
alio	por *Allium*	(aliumo f., ajlo l.)
alĥemilo		(alĉemilo f.)
		(alkemisto f.)
alolĥtono		(aloktono f.)
		(aluvio f.)
		(alvuso f.)
ambrozio		(ambrosio f.)
amfibraĥo		(amfibrako f.)
		(ampelopso f., partenociso sc.)

ampulo		(ampolo l.)
analĥronismo		(anakronismo f.)
analgetiko		(analgeziko f.)
anariĥad/o	-edoj por *Anarrhichadidae*	(anariko f.)
anarĥio		(anarkio f.)
anato	-edoj, -enoj por *Anatinae*	(anaso l.)
anato kverkvedula	unuvorte: kverkedulo	(kerkedulo f., marĉanaso, l.)
		(ančovo l., engraŭlo sc.)
angvilo		(angilo f.)
		(angiospermoj ref. al magnoliofitoj)
angv/o	-edoj por *Anguidae*	(angviso f.)
		(anilo, l., indigofero sc.)
		(anstromo f.,
		angstromo ref. al nanometro)
anĥuzo		(ankuzo f.)
antidorkado		(antidorko f.)
Antilibano		(Antilebanono f.)
antitartarata		(antitartrata f.)
antraĥinono		(antrakinono f.)
		(antrakonito, f.)
antrako	kohera kun antrakozo	(antrakso f.)
antropo/	nur kiel pseŭdoprefikso	(antrop/o, f.)
		(antropopiteko, f.)
anto		(antuso f.)
Antonino		(Antoneno f.)
ansuo	= armeniako ansua	(anzuo f.)
antraĥinono		(antrakinono f.)
anturio sc.		(flamengofloro l.)
ap/o	-edoj por *Apidae*	(abelo l.)
apiko		(apekso f.)
apoziopezo		(aposiopezo f.)
apod/o	-formaj por *Apodiformes*	(apuso f.)
aro	por la papago kaj la planto	(arao f., arumo f.)
arabido		(arabiso f.)
araĥido		(arakido f.)
araĥinoido		(araknoido f.)
		(arbedo l., frutiko sc.)
Aristarĥo		(Aristarko f.)
aristolohio		(aristolokio f.)
arĥaika		(arkaika f.),
arĥaiko, arĥeozoiko		(arkeano f.)

arĥeologo		(arkeologo f.)
arĥeopterigo		(arkeopterigo f.)
arĥetipo		(arketipo f.)
arĥi/	pseŭdoprefikse	(arki/ f.)
Arĥiloho		(Arkiloko f.)
Arĥimandrito		(arkimandrito f.)
Arĥimedo		(Arkimedo f.)
arĥipelago		(arkipelago f.)
arĥipteroj		(arkipteroj f.)
arĥitekto, arĥitekturo		(arkitekto f., arkitekturo f.)
arĥileŭto		(arkileŭto f.)
arĥitravo		(arkitravo f.)
arĥivo		(arkivo f.)
arĥivolto		(arkivolto f.)
arĥonto		(arkonto f.)
arko		(arkuso f.)
Artemido		(Artemiso l.)
artokarpo heterofila sc.		(jakvo l.)
astato		(astateno f.)
astraĥano		(astrakano f.)
atlanto	= akso por la vertebro	(aksiso f.)
atriplico		(atriplo f.)
aŭrikulo		(aŭriklo f.)
aŭtarĥio		(aŭtarkio f.)
aŭtohtono		(aŭtoktono f.)
azino sc.		(azeno, l.)
azimino		(azimeno f.)

B

bacilarioficeoj sc.		(diatomoj l.)
Balĥaŝo		(Balkaŝo f.)
baloto		(baloteo f.)
		(balzo l., ohromo sc.)
bambuzo		(bambuso f.)
		(banjano, l., fiko bengala, sc.)
barbo	por la fiŝo	(barbio, f., barbfiŝo, l.)
Barentsa		(Barenca f.)
barĥano		(barkano f.)
batohroma		(batokroma f.)

batraĥo		(batrako f.)
Baŭcido		(Baucis f.)
baziliko	por la planto	(bazilio f.)
beduino		(bedueno f.)
belido	por la planto	(beliso f.)
Benjamino		(Benjameno f.)
Berberid/o	-acoj por *Berberidaceae*	(berberiso f.)
Betelgaŭzo		(Betelĝuzo f.)
		(blendo, f.)
boo		(boao f.)
		(bobolinko f., doliĥonigo sc.)
bombico	-edoj por *Bombycidae*	(bombikso f.)
Bonaero		(Buenos-Ajreso f.)
boragin/o	-acoj por *Boraginaceae*	(borago f.)
bovisto	por la fungo	(bovisteo f.)
bradipod/o	-edoj por *Bradypodidae*	(borago f.)
braĥialo		(brakialo f.)
braĥicefalo		(brakicefalo f.)
branĥo		(branko l.)
branĥiostomo		(brankiostomo f.)
Brizeido		(Brizeis f.)
bronĥo		(bronko f.)
		(brunelo f., →prunelo por *Prunella*)
bucerot/o	-edoj por *Bucerotidae*	(bucero f.)
budlejo		(budleo f.)
bufon/o	-edoj por *Bufonidae*	(bufo, l.)
bugenvileo		(buganvilo f.)
bukcino		(bukceno f.)

C

cefalalgio		(cefaleo f.)
ceibo sc.		(kapoko l.)
ceko		(cekumo f.)
celastro sc.		(ĉato f.)
		(Celebeso = Sulaveso)
celestino		(celestito f.)
cerambic/o,	-edoj por *Cerambycidae*	(cerambiko f.)
ceratonio sc.		(karobujo l.)

cerazo sc.	por la arbo	(ĉerizo, l.)
Cerero		(Ceres f.)
ceteraĥo		(ceterako f.)
ciano	ankaŭ por la planto	(cejano l. = centaŭreo ciana sc.)
cicero	por *Cicer*	(kikero f.)
ciklosilikato		(ringsiliciato f. sub siliciato f.)
ciĥori/o	-acoj por *Cichoriaceae*	(cikorio l., kompozitoj l.)
cikado	ankaŭ por la planto	(cikaso f.)
cikoni/o	-edoj por *Ciconiidae*	(mankas la famili-nomo)
cimico	-edoj por *Cimicidae*	(cimo l.)
cinabarito	por la mineralo	(cinabro l.)
cinamomo	por la planto	(cinamo l.)
cinĥono		(kinkono f.)
ciro	ankaŭ por la nubo	(ciruso f.)
circ/o	–enoj por *Circinae*	(cirkuo f.)
cisto		(kisto f.)
citoĥromo		(citokromo f.)
citro	ankaŭ por la arbo	(citruso f.)

Ĉ

(ĉalazio f.)
(ĉamo l., rupikapro sc.)
(ĉampinjono l., agariko sc.)
(ĉato f., celastro sc.)
(ĉensiliciato f., sub siliciato f.)
(ĉensilikato l., inosilikato sc.)
(ĉerimolio f., ĉerimolo, l.
→ ĥerimolo, sc.)
(ĉerizo l., cerazo sc. por la arbo)
(ĉevalo l., ekvo kabala sc.)
(ĉifĉafo l., filoskopo sc.)
(ĉiko l., tungo sc.)
(ĉimo f., ĥimo sc.)
(ĉimpanzo l., pano sc.)
(ĉoto l., kotto
→ –edoj por *Cottidae*)

D

Dafnido		(Dafniso f.)
daktilido		(daktiliso f.)
damo	ankaŭ por cervo dama	(damao f.)
Danaeso		(Danae f.)
dato	por ĉiu donitaĵo	(datumo f.)
dazipod/o	-edoj *Dasypodidae*	(dazipo f.)
Deboro		(Debora f.)
Dejaniro		(Dejanira f.)
delfino		(delfeno l.)
demodiko		(demodekso f.)
demodikozo		(demodeksozo f.)
Desdemono		(Desdemona f.)
diaĥilo		(diakilo f.)
diaĥrona		(diakrona f.)
diatomoj	kohere kun diatomito	(diatomeoj f., bacilarioficeoj)
dilĥlorido		(diklorido f.)
dilĥotoma		(dikotoma f.)
dilĥroa, dilĥroismo		(dikroa, dikroismo f.)
diefenbaĥio		(difenbakio f.)
dipnooj		(dipnoj f.)
dipterigo		(dipteriko f.)
diptiĥo		(diptiko f.)
distiĥo		(distiko f.)
Dĵakarto		(Ĝakarto f.)
Dĵibuto		(Ĝibutio f.)
dogerio		(dogero f.)
dodekaedro sc.		(dudekedro l.)
doliĥocefalo		(dolikocefalo f.)
doliĥonigo sc.		(bobolinko f.)
draĥmo		(drakmo f.)
drakunkulo		(drakunkolo f.)
drime/o	-acoj por *Drimeaceae*	(drimiso f.)
dromedario sc.		(dromedaro l.)
dromice/o	-edoj por *Dromiceidae*	
dulkamaro	por solano dulkamara	(dolĉamaro l.)
		(dzeta f.)

E

Egipt/o	por la lando, -ano	(Egiptio f.)
eĥidno		(ekidno f.)
eĥino		(ekino f.)
eĥinodermoj		(ekinodermoj f.)
eĥinokoko		(ekinokoko f.)
eĥinopo		(ekinopso f.)
eĥinorinĥo		(ekinorinko f.)
eĥio		(ekio f.)
eikozaedro		(ikosaedro f.)
ekĥimozo		(ekimozo f.)
ekzarĥo		(ekzarko f.)
elasmobranĥioj	por *Elasmobranchii*	(elasmobrankoj f.)
eleido		(eleo f.)
eleoĥarito		(eleokarito f.)
Eleŭzino		(Eleŭziso f.)
Elviro		(Elvira f.)
		(Elzaco f.)
Emeriĥo		(Emeriko f.)
Emmo		(Emma f.)
enteleĥio		(entelekio f.)
eparĥio		(eparkio f.)
epulido		(epuliso f.)
erinac/o	-enoj por *Erinacinae*	
ermineo	por mustelo erminea	(ermeno l.)
Eroto		(Eroso f.)
erupcii		(erupti f.)
esĥatologio		(eskatologio f.)
eŭgenio sc.		(grumiksamo l.)
eŭĥaristio		(eŭkaristio f.)
eŭnuĥo		(eŭnuko f.)
eŭonimo		(evonimo f.)
Eŭstaĥio		(Eŭstakio f.)

F

fago	por bakteriofago, fagocito k.t.p.	(faĝo f.)
fakoĥero	por *Phacochoerus*	(fakoĉero f.)
faliko	el la greka *fallikos* = peniso	(faluso f.)
falaropod/o	-edoj por *Phalaropodidae*	(falaropo f.)
falenopsido		(falenopso f.)
falkon/o	-edoj por *Falconidae*	(falko l.)
falo	ankaŭ geologie	(faŭlto f.)
Faro		(Faroso f.)
fazeolo	ankaŭ por *Phaseolus*	(fazeoluso f.)
fazian/o	-edoj por *Phasianidae*	(fazano l.)
fel/o	-edoj por *Felidae*	(feliso f.)
fenico	ankaŭ por *Phoenix*	(feniko f.)
fenikulo sc.		(fenkolo l.)
		(fenugreko l., trigonelo fojno greka s.)
ferulo		(ferolo f.)
fiko	por *Ficus*	(fikuso f.)
filodendrono		(filodendro f.)
filosilikato		(folisiliciato f., sub siliciato f.)
filoskopo sc.		(ĉifĉafo l.)
filono	por la greka *phylon*	(filumo f., ne el *phyllum*!)
		(flamengo l., fenikoptero sc.)
		(flamengofloro l., anturio sc.)
flezo		(fleso f.)
flogo	flogofolia = *phlogifolius*	(flokso l.)
florideoficeoj		(florideoficoj f.)
Floro		(Flora f.)
foksino		(fokseno f.)
folikulo, folikulino, folikulito		(foliklo f.) (oestrono f.)
foradendrono		(foradendro f.)
forcipo		(forcepso f.)
		(formolo f.)
fotogrammetrio	kp. kun grammolekulo	(fotogrametrio f.)
fotoĥromio		(fotokromio f.)
fraksino		(frakseno l., fraksinelo f. → diktamno)
francio		(franciumo f.)

frangulo		(frangolo l.)
Freŝeto		(Freŝeo f.)
frigane/o	-edoj por *Phryganeidae*	(frigano f.)
fringil/o	-edoj por *Fringillidae*	(fringo l.)
		(fringelo f. = karduelo spina)
frutiko sc.		(arbedo l.)
fungo	ankaŭ por la tumoro	(funguso f.)
funikulo	kp. kun funikularo	(funiklo f.)
furunkul/o, -ozo		(furunko l.)

G

		(gajako f., gvajako f.)
galeg/o	ankaŭ por la planto	(galgo f.)
galenit/o		(galeno f.)
galeopsido		(galeopso f.)
galango l.,		(alpinio genre)
galinulo		(galinolo f.)
galla acido, gallato		(gajla acido l., gajlato f.)
gall/o	-oformaj por *Galliformes*	(galino f.)
		(galiumo f.)
Gano		(Ganao f.)
garulo		(garolo f.)
Gazo		(Gazao f.)
gelatino		(gelateno f.)
gemina		(ĝemina f.)
geneto		(genoto f.)
geoĥemio		(geokemio f.)
geoĥronologio		(geokronologio f.)
		(georgino l., dalio sc.)
geo	por la planto	(geumo f.)
ger/o	-edoj por *Gerridae*	(geriso f.)
Gerdo		(Gerda f.)
geotekĥniko, geotekĥnologio		(geotekniko f.)
		(gimnospermoj l., pinofitoj sc.)
glacialo, interglacialo		(glaĉero f. = glaciego)
gleditsio		(gledičio f.)
gleĥomo		(glekomo f.)
		(glucinio f., berilio sc.)

glutamato		(glutamo f.)
graciolo	kp. kun *Gracioj*	(gratiolo f.)
Grakĥoj		(Grak(k)oj f.)
granato	ankaŭ por la mineralo	(grenato f.)
		(granolo f.)
		(grapolo l., racemo sc.)
		(graviolo l., anono sc.)
		(grebo l.)
		(grejso l., sabloŝtono sc.)
		(grenadilo l., pasifloro sc.)
		(grifo l.)
guajako		(gvajako f.)
guanako		(gvanako f.)
guarano		(gvarano f.)
		(gvemulo l., hipokamelo sc.)

Ĝ

		(Ĝakarto f., Ďjakarto)
		(Ĝibutio f., Ďjibuto)
		(ĝemina f., gemina)
		(ĝerboso f., dipodedo sc.)
Ĝenovevo		(Ĝenoveva f.)
		(ĝermeno f., germino)

H

habit/i, -ejo		(habitato f.)
		(Hajnano f., Ĥajnano)
haliĥero		(halikero f.)
haluco		(halukso l.)
		(hamstro l., kriceto sc.)
		(Harbino f., Ĥarbino)
harengo sc.		(haringo l.)
harmonio	ankaŭ por la instrumento	(harmoniumo f.)
haruspiko		(haruspekso f.)
Hefaisto		(Hefesto f.)
heksaedro sc.		(sesedro l.)
heliĥrizo		(helikrizo f.)

hematopodo		(hematopo f.)
hemerokalido		(hemerokalo f.)
hemistiĥo		(hemistiko f.')
		(Henano f., Ĥenano)
heneikoz/		(henikoz f.)
heptagono sc.		(sepangulo l.)
Hero		(Hera f.)
Herakleito		(Heraklito f.)
hiacinto	ankaŭ por la mineralo	(jacinto f.)
hidroĥero		(hidrokero f.)
hidroĥarito		(hidrokarito f.)
hidropo		(hidropso f.)
hierarĥio		(hierarkio f.)
		(hikorio l., kario ovata sc.)
Higio		(Higiea f.)
Hildo		(Hilda f.)
hilo	ankaŭ somatologie	(hilumo f.)
hiosciam/o, -ino		(hiskiamo l., hiskiamino f.)
hipofao		(hipofeo f.)
hipoĥondr/o, -io		(hipokondro f.)
hipokamelo sc.		(gvemulo l.)
Hipolito		(Hipolite f.)
hipolaido		(hipolao f.)
hipsoĥroma		(hipsokroma f.)
holosteo		(holosto f.)
homoĥromio		(homokromio f.)
Honolulo		(Honoluluo f.)
		(Hubejo f., Ĥubejo)
		(Hunano f., Ĥunano)

Ĥ

Ĥajnano	(Hajnano f.)
ĥakia	(kakia f.)
ĥalazio	(kalazio f.)
Ĥalcedono, ĥalcedono	(Kalcedono, kalcedono)
Ĥalcido, Ĥalcidiko	(Kalcido, Kalcidiko f.)
ĥalkopirito	(kupropirito f.)
Ĥangĝoŭo	(Hangĝoŭo f.)

ĥameropo		(kameropso f.)
ĥamomilo s.c.		(kamomilo l.)
ĥaro		(karao f.)
Ĥarbino		(Harbino f.)
ĥaradri/o	-edoj por *Charadriidae*	(karadrio f.)
ĥaradrioformaj	por *Charadriiformes*	(karadri(o)formaj f.)
ĥaritoj, ĥaritato		(karisoj f.) (karitato f.)
ĥarismo		(karismo f.)
Ĥarono		(Karono f.)
Ĥartumo		(Kartumo f.)
ĥedivo		(kedivo f.)
ĥeliceroj		(keliceroj f.)
ĥelidonio		(kelidonio f.)
ĥemio		(kemio f.)
Ĥenano		(Henano f.)
ĥenopodio		(kenopodio f.)
Ĥeopso		(Keopso f.)
ĥerimolo		(ĉerimolo f.)
ĥiasmo		(kiasmo f.)
ĥilo		(ĉilo f.)
ĥimo, ĥimozino		(ĉimo, ĉimozino f.)
ĥinhidrono		(kinhidrono f.)
ĥinino, ĥinolino, ĥinono		(kinino, kinolino, kinono f.)
ĥiromantio		(kiromancio f.)
Ĥirono		(Kirono f.)
ĥiropraktiko		(kiropraktiko f.)
ĥirurgo		(kirurgo f.)
Ĥitidoj		(Kitidoj f.)
ĥitino		(kitino f.)
ĥitono		(kitono f.)
ĥlamido, ĥlamidosporo		(klamido, klamidosporo f.)
ĥloro, ĥloralo		(kloro, kloralo f.)
ĥloramfenikolo		(kloramfenikolo f.)
ĥlorelo, ĥlorito		(klorelo, klorito f.)
ĥlorofilo, ĥloroformo		(klorito, kloroformo f.)
ĥloroplasto		(kloroplasto f.)
ĥloropreno		(kloropreno f.)
ĥlorozo		(klorozo f.)
ĥoano		(koano f.)

ĥoleagoga		(koleagoga f.)
ĥoleato		(koleato f.)
ĥolecisto	kp. kun cisto	(kolecisto f.)
ĥoledoĥo		(koledoko f.)
ĥoleemio		(koleemio f.)
ĥolelitiazo		(kolelitiazo f.)
ĥolepodo		(unaŭo f.)
ĥolero		(kolerao f.)
ĥolerika		(kolerika f.)
ĥolesterolo		(kolesterolo f.)
ĥondro		(kondro f.)
ĥondrito		(kondritoj f.)
ĥondrosteo		kondrosteo f.)
ĥoreografio		(koreografio f.)
ĥorizo		(korizo f.)
ĥoro		(koruso f.)
ĥoroideo		(koroido f.)
ĥrismo		(krismo f.)
ĥrizalido sc.		(krizalido l.)
ĥrizantemo		(krizantemo f.)
Ĥrizeido		(Krizeis f.)
Ĥrizipo		(Krizipo f.)
ĥrizokalo		(krizokalo f.)
ĥrizolito		(krizolito f.)
ĥrizomelo		(krizomelo f.)
ĥrizopo		(krizopo f.)
ĥrizoprazo		(krizoprazo f.)
Ĥrizostomo		(Krizostomo f.)
ĥromo sc.		(kromo l.)
ĥromato		(kromato f.)
ĥromatino		(kromaino f.)
ĥromatografio		(kromatografio f.)
ĥromofotografio		(kromofotografio f.)
ĥromosfero		(kromosfero f.)
ĥromosomo		(kromosomo f.)
ĥromotipio		(kromotipio f.)
ĥronika		(kronika f.)
ĥronografo		(kronografo f.)
ĥronologio		(kronologio f.)

ĥronometro	(kronometro f.)
Ĥubejo	(Hubejo f.)
Ĥunano	(Hunano f.)

I

ibiko sc.	(ibekso l.)
	(-icid/ f.)
ido sc.	(iduso f.)
iguano, iguanodonto	(igvano, igvanodonto f.)
iĥneŭmono	(ikneŭmono f.)
	(ignamo l., dioskoreo sc.)
iĥoro	(ikoro f.)
iĥtiozo	(iktiozo f.)
iĥtiofagio	(iktiofagio f.)
iĥtiologo	(iktiologo f.)
iĥtiosaŭro	(iktiosaŭro f.),
iĥtiopterigoj	(iktiopterigoj f.)
	(ikosaedro f., eikozaedro sc.)
	(ikoz/ f., eikoz/)
ilico sc.	(ilekso l.)
Ilinoiso	(Ilinojso f.)
ilio	(iliumo, iljo f.)
impaciento	(impatiento f.)
indio	(indiumo f.)
indr/o -edoj por *Indridae*	(indrio f.)
Indo	(Induso f.)
infundibulo	(infundiblo f.)
ingvino sc.	(ingveno l.)
Inko	(Inkao f.)
inkunabulo	(inkunablo f.)
Iovo	(Iovao f.)
ipekakuanho por uragogo ipekakuanha	(ipeko 1.)
isĥemio, isĥio	(iskemio, iskio f.)
isĥiato, isĥiatiko	(iskiato, iskiatiko f.)
Iŝtaro	(Iŝtar f.,)
Izabelo	(Izabela f.)
izatido	(isato f.)
izoĥrona	(izokrona f.)

J

jabiro	(jabiruo f.)
	(jacinto f., hiacinto)
	(jado f., ĵadeito, jadeitito)
jaĥto	(jakto f.)
	(jakvo 1.,
	→ artokarpo heterofila sc.)
	(Jamajko f., Ĵamaiko)
jasmino sc.	(jasmeno 1.)
jaspido	(jaspo f., jaspiso f.)
Jeriĥo	(Jeriko f.)
Joaĥimo	(Joakimo f.)
Jono	(Jona f.)
	(jonkvilo f., ĵonkvilo)
Judito	(Judit f.)
jukko	(jukao f,)
Julieto	(Julieta f.)

Ĵ

ĵadeito, ĵadeitito f.)	(jado f., jadeito f., jadeitito
Ĵamaiko	(Jamaiko f.)
ĵonkvilo	(jonkvilo f.)

K

kabalo ekvo kabala sc.	(ĉevalo l.)
	(kacuro l., cercidifilo sc.)
	(kaĉaloto 1.,
	→ fizetero makrocefala sc.)
	(kateĉuo, kaĉuo f., kateĥo)
Kajafaso	(Kajafas f.)
kaĥeksio	(kakeksio f.)
	(kakia f., ĥakia)
kalandro ankaŭ por la koleoptero	(kalandrao f.)
	(kalazio f., ĥalazio)
	(Kalcedono f., Ĥalcedono)

		(kalcedono f., ĥalcedono)
		(Kalcido f., Ĥalcido)
		(Kalcidiko f., Ĥalcidiko)
		(Kalceo f., Ĥaldeo)
Kalimantano		(Borneo f.)
kalitriĥo		(kalitriko f.)
kalitrico,	-edoj por *Callithricidae*	(kalitrikso f.)
		(kalkedonio f., ĥalcedono)
kalo	ankaŭ por osta k.a. formaĵo	(kaluso f.)
kallo		(kalao f.)
kambio	ankaŭ por la histo	(kambiumo f.)
Kambridĝo	kohera kun kambrio	(Kembriĝo f.)
		(kameleono f., ĥameleono)
		(kamomilo 1., ĥamomilo sc.)
		(kamemelo f., ĥamemelo)
		(kameropso f., ĥameropo sc.)
		(kampeĉo 1. → hematoksilo kampeĥia sc.)
		(kamemoro f., ĥamemoro)
kan/o	-edoj por *Canidae*	(kaniso f.)
		(kankro l., potamobio sc.)
kanno		(kanao f.)
kanabino	por karduelo kanabina	(kanabeno f.)
		(kanguruo l., makropodo sc.)
kantarido		(kantaro f.)
		(kaoso f., ĥaoso)
kaparid/o	-acoj por *Capparidaceae*	(kaporo 1.),
		(karao f., ĥaro)
Karaĉo		(Karaĉio f.)
		(karadrio f., ĥaradrio)
karasio sc.		(karaso 1.)
karbunkulo		(karbunklo f.)
kardio		(kardjo f.)
kardio/	nur pseŭdoprofikse	(kardi/o f.)
kardunkulo		(kardono f.)
karico		(karekso f.)
kario	ankaŭ por kario ovata	(hikorio 1.)
kariopsido		(kariopso f.)
		(Karisoj f., Ĥaritoj)

		(karitato f., ĥaritato)
		(kariteo f., butirospermo)
		(Karono f., ĥarono)
karpino sc.		(karpeno 1.)
		(Kartumo f., Ĥartumo)
karunkulo		(karunklo f.)
Kasiopejo		(Kasiopeo f.)
kateĥo	ankaŭ por akacio kateĥa	(kaĉuo, kateĉuo f.)
kateĥismo, kateĥisto		(katekismo, katekisto f.)
kateĥizi		(katekizi f.)
kateĥumeno		(katekumeno f.)
kateĥolo		(katekolo f.)
Katmando		(Katmanduo f.)
kavakavo		(kavao f.)
kazuario		(kazuaro f.)
kazuarin/o	-acoj por *Casuarinaceae*	(kazuareno f.)
		(kedivo f., ĥedivo)
		(Keiranto f., Ĥeiranto)
		(kelato f., ĥelato)
		(kelicero f., ĥeliceroj)
		(kelidonio f., ĥelidonio)
		(keliferoj f., celiferoj)
		(keloido f., ĥeloido)
		(kelonio f., ĥelonio)
		(Kembriĝo f., Kambridĝo)
		(kemio f., ĥemio)
		(kenomelo f., ĥenomelo)
		(kenopodio f., ĥenopodio)
		(Keopso f., Ĥeopso)
		(kerkedulo f., kverkvedulo)
		(Keroneo f., Heroneo)
kerozino		(keroseno f.)
		(kestrelo f., tinunkulo)
		(ketognatoj f., ĥetognatoj)
		(kiasmo f., ĥiasmo)
		(Kidrono f., Ĥidrono)
		(kikero f., cicero)
Kikiĥaro		(Kikiharo f.)
		(kiliasmo f., ĥiliasmo)
		(kilopodoj f., ĥilopodoj)

		(kimero f.. ĥimero)
		(kinhidrono f., ĥinhidrono)
kinino	por la hormono	(kinino por la alkaloido f. → ĥinino)
		(kinkono f., cinĥono)
		(kinkonino f., cinĥonino)
		(kinolino f., ĥinolino)
		(kinono f., ĥinono)
		(kirala f., ĥirala)
kermesito		(kirmesito f.)
		(kiromancio f., ĥiromantio)
		(kiropraktiko f., ĥiropraktiko)
		(kiropteroj f., ĥiropteroj)
		(kirurgo f., ĥirurgo)
		(kiselguro l., diatomito sc.)
		(kisto f., cisto)
		(Kitidoj f., Ĥitidoj)
		(kitino f., ĥitino)
